

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **arena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 93 - n. 3
MAGGIO - GIUGNO 2014



AVE MARIA



Per il Mese di Maggio, tradizionalmente dedicato a Maria, proponiamo questa

"Ave Maria" al contrario

da un'idea di padre Umberto Marin (1934 – 2007), scalabriniano, che la propose a Carlo Sarandrea per una traduzione in Esperanto. La forma evoca la fiduciosa preghiera di un bambino alla sua mamma. Egli chiede senza preamboli ciò di cui ab-

bisogna e solo dopo ne pronuncia le lodi.

"Se non diventerete come bambini ..."

PREGA PER NOI PECCATORI

SANTA MARIA
MADRE DI DIO.

BENEDETTO È IL FRUTTO
DEL TUO SENO, GESÙ

E

TU SEI BENEDETTA
FRA TUTTE LE DONNE.

IL SIGNORE È CON TE
PIENA DI GRAZIA.

AVE MARIA.

Okaze de la monato Majo, tradicie dedi-

ĉita al Maria, ni proponas ĉi tiun

"Saluton Maria" renversita

el ideo de patro Umberto Marin (1934 – 2007), scalabrinano, kiu proponis ĝin al Karlo Sarandrea por la traduko al Esperanto. La konstruo elvokas la fidoplenan preĝon de infano al sia patrino. Li petas de ŝi tuj kaj senpere, kion li bezonas kaj nur poste li eldiras al ŝi siajn laŭdojn.

"Se vi ne fariĝos kiel infanoj ..." (Mat 18,3)

NUN KAJ EN LA HORO
DE NIA MORTO

PREĜU POR NI PEKULOJ

SANKTA MARIA
DIPATRINO.

BENATA ESTAS LA FRUKTO
DE VIA SINO JESUO

KAJ

BENATA VI ESTAS
INTER LA VIRINOJ.

LA SINJORO ESTAS KUN VI
GRACOPLENA.

SALUTON MARIA.



LA MARIAJ MONATOJ

Riassunto: Il mese della Madonna è presente nei calendari delle Chiese Cattoliche ed Ortodosse, ma non è ovunque il mese di maggio. Nella Chiesa Bizantina il mese di Maria è il mese di Agosto, incentrato sulla festa della "Dormizione di Maria" (la nostra Assunzione). Nella Chiesa Copta (egiziana) invece è nel mese di Kiak (quarto mese del calendario copto: dal nostro 10 dicembre al 8 gennaio) ed è incentrato sulla celebrazione del Natale. Nelle chiese occidentali il mese mariano è il mese di Maggio ed è stato proposto nel XVI secolo per contrastare le feste paganeggianti del Calendimaggio. Nel nostro calendario ci sono altri due mesi mariani: il mese di ottobre dedicato alla Madonna del Rosario in ricordo della vittoriosa Battaglia di Lepanto e il mese di settembre incentrato sulla festa dell'Addolorata.

En la Bizanca Eklezio

En ĉi tiu Eklezio la Maria Monato estas Aŭgusto, kiu entenas en sia centro la celebron de la "Endormiĝo de Maria" (nia festo de la Ĉielenpreno). La dek kvar tagoj antaŭ ĉi tiu festo, estas tagoj de fasto kaj abstino. Ĉi tiu du-semajna periodo estas nomata "Malgranda karesmo de la Endormiĝo". Dum la tuta monato en la grek-slavaj preĝejoj kaj en la monaĥejoj, granda amaso de fideluloj partoprenas en la mariaj liturgioj. Ĉi tiu praktikado originas de la 13-a jarcento el la "laus perennis" (ĉiamdaŭra laŭdo) celebrita en ĉiuj mariaj sanktejoj de Konstantinopolo laŭ la volo de la imperiestro Androniko la 2-a Paleologo (1282-1328) por danki la Virgulinon pro la liberigo el milito. La Bizanca Eklezio elmontras profundan kaj senliman devotecon al la Theotokos (Patrino de Dio). Tiu kultado komence koncernis nur la urbon Konstan-

tinopolo; fakte la tradicio raportas, ke la imperiestro Konstanteno, fondinte tiun urbon en la jaro 330, konsekris ĝin al la Virgolino. Post la defalo de Konstantinopolo en la jaro 1453, la devoteco al Maria ne

haltis, male ĝi pliprofundigis prilumante la malhelajn jarcentojn ĝis la nunaj tempoj, kiam la Theotokos subtenis la bizancan Eklezion dum la ateismaj reĝimoj orient-eŭropaj.



En la Kopta Eklezio

En ĉi tiu Eklezio la Maria Monato estas la monato Kiahk, la kvara monato de la kopta kalendaro, (de la 10-a de Decembro ĝis la 8-a de Januaro). Oni ne konas precize la daton de ĝia starigo, sed tiu tradicio estas atestata jam je la fino de la unua jarmilo. La celebrazio kulminas per la festo de Krist-

nasko, taksata kiel festo de Kristo naskita de Maria, kiu donis Lin al la mondo. La fideluloj sin preparas al tiu festo ankaŭ per fasto nomata "Fasto de la Naskiĝo" aŭ

“*Fasto de Maria*”; la koptoj asertas, ke la Virgulino mem praktikis tiun faston antaŭ la naskiĝo de Jesuo. Ili celebras ĉi tiun monaton ĉiunokte dum la tuta monato, per tranoktaj preĝadoj. La kultado al Maria fare de la kopta Eklezio estas tre disvastiĝinta kaj originas el la pratempoj. Pro la ĉeesto de la Sankta Familio en Egiptujo, la koptoj konsideras sian landon kiel disbranĉiĝon de la Sankta Lando. En Egiptujo, aperis unuafoje la vorton *Theotokos* (Patrino de Dio) kaj estos Sankta Cirilo de Aleksandrio la defendanto de tiu titolo kontraŭ la herezo de Nestorio dum la Koncilio de Efezo (431).

En la Okcidentaj Eklezioj

En ĉi tiuj Eklezioj la maria monato estas Majo. Tiu elekto ne estas malnova. Ĝia origino estas en la 16-a jarcento, tamen oni trovis kelkajn atestojn de mariaj kultoj en Majo jam en la 13-a jarcento. La unua, kiu kunligis la figuron de Maria al la monato Majo estis la reĝo de Kastilio-kaj-Leono Alfonso la 10.a, nomata la Saĝulo (1221-1284). Tamen estas la Renesanco la periodo en kiu la animzorgantoj decidis dediĉi al Maria la majan monaton kiel bariĵon kontraŭ la paganecaj majaj festoj nomataj *Calendimaggio*. Komence tiu praktiko disvastiĝis en Romo fare de Sankta Filipo Neri, en Fiesole fare de la dominikanoj, kaj poste, en Napolo, Mantova, Ferrara, Verona estis ekflorado de Majaj Monatoj unue sporadaj kaj poste ĉiam pli organizitaj.

La veraj inspirantoj de la Maja Monato estas konsiderataj tri Jezuitoj, kiuj pere de siaj verkoj disvastigis la praktikon ne nur



Cirilo de Aleksandrio


en Italio, sed ankaŭ en Francio, Hispanio, Belgio, Svislando, Aŭstrio, Germanio kaj Irlando. Ili estas: Annibale Donisi, per sia verko “*La monato de Maria*” eldonita en Verono en 1725; Francisko Latomia, kiu, en 1758, eldonis en Palermo “*Monato Majo*”; kaj Alfonso Muzzarelli, kiu verkis “*La monato Majo*” eldonita en Romo en 1785.

Jam en la unua duono de la 19-a jarcento, la Maja Monato estas establiĝinta en la tuta Eŭropo kaj Ameriko kaj disvastiĝanta en la misiaj landoj. La papoj Pio la 7-a (1815), Gregorio la 16-a (1833) kaj Pio la 9-a (1859) por subteni la praktikadon de la Maja Monato aplikis al ĝi apartajn indulgencojn.

En la okcidentaj Eklezioj oni povas prinoti aliajn du mariajn monatojn, ĉifoje ligitajn al liturgiaj datrevenoj. La plej populara estas la monato Oktobro, monato de la Rozario, kies centro estas la sepa de Oktobro, festo de la Beata Virgulino de la Rozario. Tiu festo estis starigita de Papo Pio la 5-a memore de la batalo de Lepanto (7-an de Oktobro 1571), kies venko estis atribuita al la preĝoj de la Rozario adresitaj al Maria fare de la kristana popolo. La alia monato estas Septembro, dediĉita al la Dolora Dipatrino. Ĝi estis proponita kaj subtenata de la “*Servistoj de Maria*” per la kulto de la “*Sep Doloroj*”, kies datreveno okazas la 15-an de Septembro. Dum la tuta monato en iliaj preĝejoj oni recitas la “*Krono de la Dolora Dipatrino*” kaj oni laŭiras la “*Vojon de la Patrino*” (*Via Matris*), kiuj anstataŭas respektive la Rozarion kaj la Krucvojon.

(Giovanni Daminelli)

Johano 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a Papo Francisko parolas pri la du novaj sanktuloj



27a de Aprilo 2014: kano-nizo de la papoj Johano 23-a kaj Johano Paŭlo la 2-a

Papo Francisko elektis la duan dimanĉon post Pasko, tagon dediĉitan de Johano Paŭlo la 2-a al la kulto de la Dia Mizerikordo, por sankt-proklami la papojn Johano kaj Johano Paŭlo.


La pasinta jarcento donis al ni grandajn papojn, sed ĉi tiuj du estas tiuj, kiuj pleje donis novan stilon al la papado.

Interalie ni esperantisto estas aparte dankemaj al papo Johano Paŭlo la 2-a pro liaj faroj favore al nia lingvo Esperanto.

Papo Francisko parolis pri ili en intervjuo dum la aviadila reveno de sia apostola vojaĝo al Rio de Janeiro (Julio 2003).

Pri papo Johano 23-a li deklaris:

«Li estis iom kiel kamparana pastro, kiu amas kaj prizorgas ĉiun fidelulon kaj li estis tia ankaŭ kiel episkopo kaj nuncio. Kiom da falsaj bapt-atestoj li faris en Turkio favore de la hebreoj! Li estis kuraĝulo, bona kamparana pastro, kun granda humura sento kaj granda sankteco. Kiam li estis nuncio, kelkaj en Vatikano ne tro amis lin, kaj kiam li estis alvenanta por porti aŭ peti ion, en kelkaj oficejoj atendigis lin. Li neniam plendis: li preĝis la rozarion, legis la brevieron. Milda, humila, li ankaŭ zorgis por la malriĉuloj. Kiam kardinalo Casaroli revenis el diplomata misio – eble en Hungario aŭ en la iama Ĉeĥoslovakio, mi ne memoras en kiu el la du – ĉi tiu iris al li por raporti pri sia misio en tiu epoko de la diplomatio de la “etaĵ paŝoj”; li ricevis lin en aŭdienco (Johano 23-a mortis post dudek tagoj), kaj, kiam Casaroli estis foriranta, li haltigis lin: “ha, ekscelenco, demandon: ĉu vi daŭrigas iri al tiuj junuloj?”. Ĉar Casaroli vizitadis la karceron de la neplenaĝuloj de Casal di Marmo, kaj ludis kun ili ... Kaj Casaroli “jes, jes”. “Forlasu ilin neniam”. Ĉi tion al diplomato alveninta de tiel grava vojaĝo...



Johano 23-a estis grandulo. Grandulo. Kaj poste la Koncilio. Homo obeema al la voĉo de Dio, Ĉar tio venis al li el la Sankta Spirito, kaj li estis obeema. Pio la 12-a intencis fari tion, sed la cirkonstancoj ankoraŭ ne estis maturaj. Johano la 23-a ne faris al si zorgojn pri la cirkonstancoj, li sentis tion kaj li tion faris; homo, kiu lasis sin gvidi de la Sinjoro.»

Pri Johano Paŭlo la 2-a li aldonis:

«Pri Johano Paŭlo la 2-a mi emas diri: granda misiisto de la Eklezio. Li estas misiisto, homo kiu portis la Evangelion ĉien, vi scias pli bone ol mi, li iris, he, li sentis ĉi tiun fajron, disfamigi la vorton de la Sinjoro, li estis tia homo kia Sankta Paŭlo; tio por mi estas granda.»



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

DIO E NESSUN ALTRO

Per esprimere il massimo dell'amore ogni innamorato ama ripetere: "Ti amerò immensamente per sempre". Sentirsi dire questo, procura tanta gioia in chi ascolta. Tuttavia l'amato esulta molto di più quando si sente dire: "Amore, non ti lascerò mai! Non ci sarà nessun altro per me al posto di te!". Questa espressione offre una garanzia molto più convincente. Dando la misura minima dell'amore, si esclude ogni forma inferiore.

In "Appunti sull'amore di Dio" Simone Weil scrive: *«Credere in Dio non dipende da noi, ma dipende da noi non accordare il nostro amore a false divinità»*. Dire a Dio: "Ti amo immensamente! Tu sei tutto per me!" può portare a un trasporto d'amore, ma è molto più importante lottare contro la tentazione di disperdersi in molti amori, cioè rifiutare ad altre divinità il proprio amore.

Dopo aver proclamato: *«Io sono il Signore, tuo Dio, che ti ho fatto uscire dalla terra d'Egitto, dalla condizione servile»*, nel dare i 10 comandamenti Dio ricorda: *«Non avrai altri dèi di fronte a me»* (Es 20, 2-3). Poco sotto aggiunge: *«Non ti prostrerai davanti a loro e non li servirai, perché io, il Signore, tuo Dio, sono un Dio geloso»* (Es 20, 5). La gelosia di Dio è per il bene dell'uomo, il quale non potendo amare se stesso, è portato a umiliarsi davanti a falsi dèi, più comodi, più alla portata di mano, più simili al proprio io. Infatti *«l'uomo vorrebbe essere egoista e non può. È que-*

DIO KAJ NENIU ALIA

Por esprimi la maksimuman amon ĉiu enamiĝinto amas ripeti: "Mi ege amos vin por ĉiam". Aŭdi tiun ĉi diron adresatan al si akirigas multa da ĝojo en la aŭskultanto. Tamen la amato tre pli multe plenĝojas kiam aŭdas la diron: "Mia amo, mi forlasos vin neniam! Neniu alia estos ĉe mi anstataŭ vi!". Tiu ĉi esprimo proponas garantion tre pli konvinkan. Proponante la minimuman mezuron de la amo, oni forlasas ĉiun malsuperan formon.

En sia "Rimarkoj pri la amo de Dio" Simone Weil skribas: *«Kredi je Dio ne estas nia decido, sed estas nia decido ne aligi nian amon al falsaj diaĵoj»*. Diri al Dio: "Mi ege amas vin! Vi estas ĉio por mi!" povas porti al granda amo, sed estas tre pli grave batali kontraŭ la tento dispeŝi en sennombraj amoj, t. e. rifuzi sian amon al aliaj diaĵoj.

Proklaminte: *«Mi estas la Sinjoro, via Dio, kiu elkondukis vin el Egiptujo, el la lando de via sklaveco»*, kaj donante la dek ordonojn Dio memorigas: *«Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj krom mi»* (Eli 20, 2-3). Iom pli sube li aldonas: *«Ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu al ili, ĉar mi, la Sinjoro, via Dio, estas Dio severa»* (Eli 20, 5). La ĵaluzo de Dio estas por la bono de la homo, kiu, ne povante ami sin mem, emas sin humiligi antaŭ falsaj idoloj, pli komfortaj, pli je sia nivelo, pli similaj al si. Fakte *«la homo volus esti egoisma kaj li*

sto il carattere più impressionante della sua miseria e l'origine della sua grandezza» (S. Weil). Sempre assetato del bene assoluto, l'uomo fa fatica a mettere la propria attenzione verso l'unico Dio, fonte della vita, e non ha la pazienza di lasciarla sorgere. Eppure non può farne a meno.

Infatti, come si fa a vivere senza una fede nella vita? Se manca, sono necessarie delle passioni, delle motivazioni particolari. Nel mondo degli uomini l'idolatria risulta una necessità vitale. Simone Weil scrive a questo proposito: *«I pensieri sono mutevoli, obbedienti alle passioni, alle fantasie, alla stanchezza. L'attività deve essere continua, tutti i giorni, molte ore al giorno. Sono necessari dunque moventi dell'attività che sfuggano ai pensieri, quindi alle relazioni: idoli, appunto»*.

Leggendo le Scritture si nota che da parte di Dio c'è sempre il caldo invito a coltivare un amore profondo per evitare di sottoporsi a false divinità, surrogati del proprio io. Avendo fatto esperienza che tutti siamo disposti a morire per ciò che si ama, è giusto riconoscere la grandezza dell'amore divino e riversare solo in Dio la pienezza del nostro amore. È importante quindi tenere presente il comando di avere un solo Dio, molto più importante della somma di tutte le divinità di ogni luogo e tempo.

A tutt'oggi molti sono gli idoli che tentano di accalappiare quanti aspirano al bene assoluto. Con categorie molto umane propongono stili di vita e modalità di espressione, usando anche la forza, senza rispettare la libertà degli altri. Ma noi sappiamo che la comunicazione vera deve essere aperta a tutti, senza nessuna sottomissione, anzi, con l'onore e la gioia di esprimersi da fratelli e con fratelli sullo stesso piano.

ne povas. Estas ĉi tiu la plej impresa karaktero de lia mizero kaj la fonto de lia grandeco» (S. Weil). Ĉiam soifante la absolutan bonon, la homo penas adresi sian atenton al la unika Dio, fonto de la vivo, kaj li ne pacienças lasi ĝin estiĝi. Kaj tamen li ne povas sin deteni de ĝi.

Fakte, kiel oni povas vivi sen fido en la vivo? Se ĝi mankas, necesas pasioj, apartaj instigoj. En la mondo de la homoj la idolkulto montriĝas vitala bezono. Simone Weil skribas koncerne ĉi tiun temon: *«La pensoj estas ŝanĝiĝemaj, obeemaj al la pasioj, al la fantazioj, al la laceco. La aktiveco devas esti senĉesa, ĉiutaga, dum multaj horoj ĉiutage. Necesas do movimpulsoj de la aktiveco, kiuj eskapas el la pensoj, do el la rilatoj: idoloj, ĝuste»*.

Legante la Skribojn, oni rimarkas ke flanke de Dio estas ĉiam la varma peto flegi intensan amon por eviti la memsubmeto al falsaj diaĵoj, surgatoj de nia memo. Spertintaj, ke ni ĉiuj estas pretaj morti pro tio, kion ni amas, estas juste ke ni agnosku la grandecon de la dia amo kaj ke ni verŝu nur sur Dion la plenecon de nia amo. Gravas do ke ni konsideru la ordonon havi nur unu Dion, kiu estas tre pli grava ol la tuto de ĉiuj diaĵoj de ĉiuj loko kaj ĉiu tempo.

Ĝis hodiaŭ multaj idoloj klopodas ĉirkaŭkapti la strebantojn al la absoluta bono. Pere de tre homaj kategorioj ili proponas vivostilojn kaj dirmanierojn, uzante eĉ la perforton, sen respekti la liberecon de la aliaj. Sed ni scias ke la vera komunikado devas esti malfermita al ĉiuj, sen nenia submetado, sed, male, kun la honoro kaj la ĝojo esprimiĝi kiel fratoj kaj kun fratoj je la sama nivelo.

Dirite inter ni ...



035

METROPOLITENO

- La bileton, kien mi metis la bileton?
- Rigardu bone en la mansako.
- Ne estas eble, ke ĝi estas en la mansako.
- Nu, kontrolu ĉu ĝi estas en la poŝoj de la jakso.
- Ne, mi jam kontrolis, en ili ĝi ne estas.
- Sed, ĉu vi havis ĝin?
- Jes, mi ĝin aĉetis, kiam mi vojaĝis per la subtera fervojo por veni ĉi tien.
- Ĉu vi malplenigis la pantalon-poŝojn?
- Memkompreneble, sed mi trovis neni-on.
- Nu, restas nur unu loko.
- Kie?
- En la monujo.
- Eble vi pravas.
- Rigardu bone.
- Jen, la bileto estas ci tie.
- Bonŝance, ĉar nun la vendejoj estas fermitaj.
- Se la vendejoj estas fermitaj oni povas utiligi la aŭtomatajn disdonilojn de vojaĝo-dokumentoj
- Jes, tion oni povas fari nur se oni havas la taŭgajn monerojn.
- Oni povas utiligi ankaŭ bank-biletojn.
- Certe, sed oni riskas ne ricevi la reston.
- Ĉiuokaze oni povas aĉeti ĉiujn vojaĝo-dokumentojn pere de la aŭtomataj apa-

METROPOLITANA

- Il biglietto, dove ho messo il biglietto?
- Guarda bene nella borsa.
- Non è possibile che sia nella borsa.
- Beh, controlla se è nelle tasche della giacca.
- No, ho già controllato, lì non c'è.
- Ma, lo avevi?
- Sì, l'ho comperato quando ho viaggiato in metropolitana per venire qui.
- Hai vuotato le tasche dei pantaloni?
- Naturalmente, ma non ho trovato nulla.
- Bene, resta solamente un posto.
- Dove?
- Nel portafogli.
- Forse hai ragione.
- Guarda bene.
- Ecco, il biglietto è qui.
- Per fortuna, perché ora le rivendite sono chiuse.
- Se le rivendite sono chiuse, si possono utilizzare i distributori automatici di documenti di viaggio.
- Sì, lo si può fare solo se si hanno le monete adatte.
- Si possono utilizzare anche le monete di carta.
- Certamente, ma si rischia di non ricevere il resto.
- In ogni caso si possono comperare tutti i documenti di viaggio con gli

- ratoj.
- Ĉu vi certas?
 - Kial?
 - Ĉar al mi ŝajnas, ke kelkajn tipojn de vojaĝ-biletoj oni ne povas ricevi de la aŭtomataj maŝinoj.
 - Normalajn biletojn oni povas aĉeti.
 - Pri tio ne estas dubo.
 - Oni povas aĉeti la biletojn por vojaĝi eksterurben.
 - Ankaŭ tio estas vera.
 - Kaj per tiuj biletoj oni povas vojaĝi eĉ per trajne.
 - Per la trajnoj de la Ŝtataj Fervojoj.
 - Kaj per la trajnoj de la Nordaj Fervojoj.
 - Jes, sed en la limoj difinitaj sur la malantaŭo de la vojaĝ-dokumento.
 - Kion do oni ne povas aĉeti?
 - Ĉu oni povas aĉeti la biletojn kun la aparta kristnaska tarifo?
 - Vi pravas, tiujn oni ne povas aĉeti pere de la aŭtomatoj.
 - Kaj ankaŭ la 24-horajn biletojn, oni ne ricevas de aŭtomata aparato.
 - Tiun oni devas aĉeti ĉe la vendejoj.
 - Kaj nur ĉe kelkaj vendejoj.
 - Ha, kiom malfacilas vojaĝi!
 - Ne, ne estas malfacile, sufiĉas esti organizitaj.
 - Jen la malfacilo!
 - Kio?
 - Esti organizitaj.
 - Nu, se juĝi laŭ la tempo, kiun ni bezonis por serĉi kaj trovi nur unu bileton. . .
 - apparecchi automatici.
 - Sei sicuro?
 - Perché?
 - Perché mi sembra che alcuni tipi di biglietti da viaggio non si possono ricevere dalle macchine automatiche.
 - Si possono acquistare i biglietti normali.
 - Su questo non c'è dubbio.
 - Si possono acquistare i biglietti per viaggiare fuori dalla città.
 - Anche questo è vero.
 - E con quei biglietti si può viaggiare persino con i treni.
 - Con i treni delle Ferrovie dello Stato.
 - E con i treni delle Ferrovie Nord.
 - Sì, ma nei limiti precisati sul retro del documento di viaggio.
 - Che cosa non si può dunque comperare?
 - Si possono comperare i biglietti con la particolare tariffa natalizia?
 - Hai ragione, quelli non si possono comperare per mezzo dei distributori automatici.
 - Ed anche i biglietti validi 24 ore non si ricevono da un apparecchio automatico.
 - Quello lo si deve comperare presso le rivendite.
 - E soltanto presso alcune rivendite.
 - Ah, quanto è difficile viaggiare!
 - No, non è difficile, è sufficiente essere organizzati.
 - Ecco la difficoltà!
 - Che cosa?
 - Essere organizzati.
 - Beh, se dobbiamo giudicare dal tempo che abbiamo impiegato per cercare e trovare un solo biglietto. . .



LABORISTOJ

- Cezaro!?!
 - Karlo!
 - Ĉu vi estas tie?
 - Jes.
 - Ĉu vi estas preta?
 - Jes, mi pretas.
 - Supren!
 - Bone.
 - Atentu!
 - Kio okazas?
 - La fenestro.
 - Kiu fenestro?
 - Tiu de la dua etaĝo.
 - Kaj do?
 - Oni malfermis ĝin.
 - Akcidente al ili.
 - Oni malfermis ĝin neatendite.
 - Ĉu okazis io?
 - Ne, nenio okazis, sed ni riskis.
- Bonŝance okazis nenio.
 - Sed oni devas ĉiam atenti.
 - Vi pravas: pro tio mi observas ĉiujn sekureco-normojn.
 - Ankaŭ mi.
 - Ĉu vi vidas?
 - Kion?
 - Mi metis la kaskedon.
 - Ankaŭ mi, kompreneble.
 - Ĉu ĉio estas en ordo?
 - Jes, se vi havas la ŝnuron kun la sekurec-ligaĵoj.
 - Mi havas ĝin.
 - Nu, ni iru malrapide.
 - Jes, direktu min, ĉar mi ne vidas.
 - Konsentite.
 - Ĉu mi iru?
 - Jes, malrapide.
 - Ĉu bone?

LAVORATORI

- Cesare!?!
 - Carlo!
 - Sei là?
 - Sì.
 - Sei pronto?
 - Sì, sono pronto.
 - Su!
 - Bene.
 - Attento!
 - Che succede?
 - La finestra.
 - Che finestra?
 - Quella del secondo piano.
 - Dunque?
 - L'hanno aperta.
 - Accidenti a loro.
 - L'anno aperta improvvisamente.
 - È successo qualcosa?
 - No, non è successo niente, ma abbiamo rischiato.
 - Per fortuna non è successo nulla.
 - Ma si deve sempre far attenzione.
 - Hai ragione: per questo osservo tutte le norme di sicurezza.
 - Anch'io.
 - Vedi?
 - Che cosa?
 - Ho messo il caschetto.
 - Anch'io, naturalmente.
 - È tutto in ordine?
 - Sì, se hai la corda con gli imbragamenti di sicurezza.
 - Ce l'ho.
 - Bene, andiamo adagio.
 - Sì, guidami, perché non vedo.
 - D'accordo.
 - Devo andare?
 - Sì, adagio.
 - Bene?

- Jes, ankoraŭ iomete.
- Jen.
- Tiel.
- Ĉu ankoraŭ?
- Ne, atendu momenton: estas iom da vento.
- Ankaŭ la vento!
- Nu, kuraĝon: iomete supren.
- Ĉu tiom?
- Ne, haltu!
- Farite.
- Nun, revenu iom malsupren.
- Ĉu sufiĉe?
- Ne, ankoraŭ iomete.
- Jen!
- Haltu!
- Kaj nun?
- Nun, iru iom supren.
- Jen.
- Bone.
- Jen ankoraŭ.
- Perfekte.
- Ĉu mi tiru supren?
- Jes, ĉar ni superis la obstaklon de la fenestro.
- Jen, mi estas supre.
- Bonŝance ni rimarkis, ke oni malfermis la fenestron.
- Bonŝance.
- Nun enprenu la tutan keston.
- Jes, mi ĝin malplenigos.
- Jes, sed memoru resendi ĝin malsupren kun la dokumentoj, kiuj estas en la bretoj, dekstre.
- Kompreneble, tion oni jam diris al mi.
- Kiu diris tion al vi?
- La ĉefo, kompreneble.
- Kaj oni devas fari tion, kion la ĉefo diras.
- Jes.
- He, la ĉefo estas la ĉefo!
- Sì, ancora un pochino.
- Ecco.
- Così.
- Ancora?
- No, aspetta un momento: c'è un po' di vento.
- Anche il vento!
- Bene, coraggio, un po' in su.
- Così?
- No, fermati!
- Fatto.
- Ora vieni un po' in giù.
- È abbastanza?
- No, ancora un pochino.
- Ecco!
- Fermati !
- Ed ora?
- Ora vai un po' in su.
- Ecco.
- Bene.
- Ecco ancora.
- Perfetto.
- Devo tirar su?
- Sì, perché abbiamo superato l'ostacolo della finestra.
- Ecco, sono su.
- Per fortuna abbiamo notato che avevano aperto la finestra.
- Per fortuna.
- Ora prendi dentro tutta la cesta.
- Sì, la svuoterò.
- Sì, ma ricordati di rispedirla sotto con i documenti che sono negli scaffali, a destra.
- Naturalmente: me l'avevano già detto.
- Chi te l'ha detto?
- Il capo, naturalmente.
- E si deve fare ciò che dice il capo.
- Sì.
- Eh, il capo è il capo.

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

SINTONIE

SINTONIOJ

*Nella piccola aiuola sotto il pino
è fiorito l'ibisco, rosso
screziato di virgole
biancastre.*

*En la malgranda bedo sub la pino
floris la hibisko, ruĝa
haĉita per komoj
blankecaj.*

*Due lucertoline si rincorrono,
ruzzano
come bimbi giocosi.*


*Du lacertetoj sin postkuras,
petolas
kiel infanoj ludemaj.*

*L'agave sisalana erge
come spade le punte
aguzze verso il cielo.*

*La sisala agavo altigas
kvazaŭ glavojn la pintojn
akrajn al la ĉielo.*

*Un pettirosso salta
dal ramo alto a picco
sul palo del cancello:
cinguetta
al sole che tramonta.*

*Ruĝgorĝulo plonĝas
de l' alta branĉo apike
sur la foston de l' krado:
ĝi kvivitas
al subiranta suno.*



Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Covelli)

NOTIZIE IN BREVE

Dati i limiti di spazio, non abbiamo potuto inserire finora alcune notizie che ci coinvolgono. Lo facciamo adesso scusandoci per il ritardo. In ordine cronologico:

IKUE è in Facebook



Dal 27/02/2013 l'IKUE ha una ricca pagina in Facebook:

<https://www.facebook.com/pages/Internacia-Katolika-Unui%C4%9Do-Esperantista/263471327120529>

creata e puntualmente aggiornata da Marija Belošević. È ricca di notizie sulla Chiesa e sull'attività dell'IKUE. Chi può la visiti, ne vale la pena.

Santa Ildegarda di Bingen. (1098-1179)

Il 04/09/2013 il prof. Corrado Lepore di Castelpoto (BN) ci scrive:

Estimata Direktoro,

ĉi kune, mi kunsendas la mesan folion "La Domenica", ... ĉar mi opinias, ke tio estas tre interesa kaj utila por nia afero.

Infatti sul foglietto della Messa del 25 agosto, una nota su Santa Ildegarda afferma tra l'altro: "è patrona degli esperantisti per aver inventato una lingua artificiale, la Lingua Ignota utilizzando un alfabeto di 23 lettere."

Di fatto non è patrona degli esperantisti cattolici, perché Santa Ildegarda ha creato la "Lingua Ignota" per non farsi capire all'infuori di un gruppo ristretto di persone, quindi con scopo contrario a quello dell'esperanto. Patroni dell'IKUE sono: Nostra Signora della Speranza, Pio X, Massimiliano Kolbe, Titus Brandsma e Giovanni Paolo II.

Tuttavia è opinione comune che Santa Ildegarda sia protettrice degli esperantisti: in internet, anche in qualche sito cattolico, sono più di 20000 le citazioni che associano l'esperanto a Santa Ildegarda (si veda ad esempio in "wikipedia").



Katolika Sento

Dal 1/1/2014 la tipografia Saviolo di Vercelli, che dal 1995 stampava Katolika Sento, ha cessato l'attività. Ora viene stampato in digitale da "atena.net" di Grisignano di Zocco (VI) portando come novità la copertina a colori in previsione di stampare a colori l'intera rivista come già appare nell'edizione in rete. Katolika Sento è leggibile in rete, ancor prima della stampa, in http://www.ueci.it/k_sento

Don Giacomo Bianchini. (1875-1954)

Il 12/01/2014 nella chiesa parrocchiale di Cimpello si è ricordato con una S. Messa, in italiano ed esperanto, il 60° anniversario della morte di don Giacomo Bianchini. Alla cerimonia era presente un gruppo di esperantisti. Nei primi 4 numeri di Katolika Sento del 2005 si è riferito sulle manifestazioni in commemorazione del cinquantenario della sua morte. Egli viene ricordato tuttora dai suoi parrocchiani per la sua dedizione pastorale, ma è ricordato anche per la sua vasta cultura e perché è una figura importante nel mondo esperantista italiano. Fu uno dei fondatori della "Cattedra Italiana di Esperanto" e della rivista "L'Esperanto", membro de la "Lingva Komitato" e poi de la "Akademio de Esperanto" e segretario dell'IKUE.

Di fianco è riportata la poesia che scrisse nel 1963, in occasione del 50° anniversario della sua prima Santa Messa.

1903 – 3 Aŭgusto – 1963


*Kvindekjaroj jam forpasis
Ĉe l' altaro de l' Sinjor';
Kiu vivon al mi lasis
En la ĝojo kaj dolor'.*

*Ho Jesuo nun rigardu
Ĉi serviston en maljun':
Lin helpadu, lin Vi gardu,
Lin pardonas, ne lin pun'.*

*Se per pekoj, mia Dio,
Estis mi iafoj' vundit',
La labor' por la Eklezio Vi
kalkulu je merit'.*

*Ho Vi princo de l' paŝtistoj,
De la vivo ĉe la fin'
Min Vi metu ĉe l' servistoj
Por eterne laŭdi Vin.*

Espero Katolika



Il 10 marzo è uscito il n. 1-3/2014 di Espero Katolika, finalmente di nuovo puntuale. La pubblicazione di Espero Katolika, negli ultimi anni ha subito notevoli ritardi, per questo si sono persi numerosi abbonati. Negli ultimi tempi, superate alcune difficoltà tecniche e di personale, si è proceduto a recuperare il tempo perduto, per cui, non solo l'ultimo numero è uscito puntualmente, ma si è riusciti a stampare e inviare agli abbonati anche tutti i numeri precedenti. Espero Katolika è stato fondato nel 1903 ed il più antico periodico esperantista ancora vivente. Non lasciamolo morire. Abboniamoci o rinnoviamo il nostro abbonamento. È l'organo ufficiale dell'IKUE, ricco di notizie su di noi e sulla Chiesa per di più scritto in un buon esperanto.

Urbi et Orbi



20 aprile. Pasqua. Per la 26-a volta il solito gruppo di esperantisti è in Piazza San Pietro con i suoi pannelli per la benedizione Urbi et Orbi. Come si sa, Papa Francesco fa gli auguri solo in italiano, tuttavia abbiamo voluto essere presenti, a fianco dei molti che sventolavano i propri vessilli, per rappresentare idealmente l'intera umanità riunita sotto la scritta ESPERANTO. La mancanza degli auguri in esperanto ha però comportato diverse conseguenze:

– Non c'è più quel momento, tanto atteso dagli esperantisti, quando il Papa saluta in esperanto e la televisione inquadra i nostri pannelli. Ora questi si vedono solo incidenten-

talmente durante qualche panoramica.

– Per questo motivo è venuto a mancare il sufficiente numero di esperantisti per sostenere i pannelli e qualcuno dei presenti ha dovuto sostenere due cartelli.

– In questa Pasqua, già alle 9 del mattino la piazza era quasi piena e poco dopo sono stati chiusi gli accessi. Ci siamo trovati in tre a dover sostenere le 9 lettere. Più tardi altri tre sono riusciti a raggiungerci e così abbiamo potuto mettere in mostra la nostra scritta.

– La cosa più grave però è avvenuta all'ingresso della piazza. Per motivi di sicurezza non volevano lasciarci entrare con la nostra attrezzatura. Solo grazie alla capacità dialettica di Gianni Conti, all'intervento del capo delle guardie e dopo molte insistenze ci hanno lasciati entrare. (Qualcuno avrà notato che molte bandiere e striscioni erano sostenuti con le mani, perché per ragioni di sicurezza sono state sequestrate tutte aste di sostegno di una certa consistenza).

– Per tutti questi motivi si è deciso di sospendere ogni nostra presenza in piazza San Pietro per la benedizione Urbi et Orbi.

Bibliaj Tagoj

Dal 30 aprile al 4 maggio in località Tuchoměřice (Praga) si svolgono i Bibliaj Tagoj. L'incontro, a carattere ecumenico, è organizzato ogni anno da Stefan Lepping.

La notizia non ci è giunta in tempo per la pubblicazione sul precedente numero di Katolika Sento, tuttavia vi partecipano almeno tre italiani dai quali ci aspettiamo una relazione, così come è avvenuto lo scorso anno per il Bibliaj Tagoj di Strasburgo.

Ekumena Esperanto-kongreso

Dal 16 al 26 agosto si terrà a Trento (Cadine) il Congresso Ecumenico. Stanno giungendo adesioni da tutta Europa, ma sono ancora poche quelle italiane. È un avvenimento importante ricco di incontri, momenti ecumenici e anche di svago. Diamo il nostro contributo al dialogo ecumenico con la nostra presenza. Dopo anni di contrasti tra le diverse Chiese è giunto il momento della riconciliazione. Il congresso si svolge in Italia; per favore, non facciamo mancare la nostra presenza.

L'elenco aggiornato degli iscritti è in in: <http://www.ueci.it/aligxiloj/Aligxintoj/>.

Il nostro Assistente Ecclesiastico, mons. Giovanni Balconi, anche quest'anno ci ha inviato gli auguri di Buona Pasqua con una poesia. Questa volta ha scelto un testo del poeta italiano Marco Beck:

*"Ma se sapremo estrarre dalla pietra
il nostro cuore facendolo aderire strettamente
al cuore del Riemerso dal sepolcro,
al suo rigenerato, inarrestabile pulsare,
ecco sentiremo, nel chiarore ancora incerto,
nel silenzio dell'anima e dell'alba,
che Lui, l'Ucciso, è vivo".*



Marco Beck è stato capace di trasporre in poesia, con sottigliezza e sfumature ai limiti dell'inafferrabile, il desiderio della vita nuova che la Pasqua comporta.

(disegno di don Sebastiano Jervolino)

Nia Eklezia Asistanto, monsinjoro Giovanni Balconi, ankaŭ ĉijare sendis al ni siajn Paskajn Bondezirojn pere de poezio. Ĉi fojon li elektis tekston de la itala poeto Marco Beck:

*"Sed se ni kapablus eltiri el la ŝtono
nian koron strikte adheriginte ĝin
al la koro de la Releviĝinto el la tombo,
al ĝia regenerita, nehaltigebla pulsado,
jen, ni sentos, en la helo ankoraŭ malcerta,
en la silento de l' animo kaj de l' tagiĝo,
ke Li, la mortigito, vivas".*

Marko Beck sukcesis enversigi, subtilece kaj per nuancoj ĉe la limoj de la neatingebla, la deziron de la nova vivo kuntrenata de la Pasko.

(desegno de pastro Sebastiano Jervolino)

GIOVANI CONCORRETE

L'UECI dispone ancora di n° 3 premi da 258,23 € ciascuno da assegnare a giovani di età compresa tra i 18 e 30 anni, iscritti all'UECI che conseguano il diploma di esperanto di terzo grado. I premi saranno erogati quale contributo per la partecipazione a un congresso dell'UECI o dell'IKUE. Gli interessati si rivolgano al presidente UECI

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it *(la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)*

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



El transmondo

Geedzoj, okaze de sia arĝenta nupta jubileo, deziras vojaĝi al Kariboj, kie komenciĝis antaŭ 25 jaroj ilia miela tempo. Lastmomente ŝi ne povas ekveturi kun la edzo pro laboraj kialoj, sed ŝi atingos lin post kelkaj tagoj. Alveninte sola al la hotelo, la edzo sendas tuj ret-mesaĝon al la edzino, sed li eraris la ret-adreson, pro tio la mesaĝo atingas la ret-keston de nova vidvino, ĵus reveninta el la funebro de sia edzo. Imagu ŝian konsterniĝon, kiam ŝi legas ĉi tiun mesaĝon:

"Mia kara edzino, mia vojaĝo estis serena kaj feliĉa la alveno. Ĉio bone. Nun, ĉi tie estas eĉ komputilo kaj mi tuj profitas por sciigi al vi, ke ĉi tie ĉio estas en ordo, ankaŭ por vi, kiam vi alvenos, la venontan vendredon. Mi sopire atendas vin kaj bonde-

ziras al vi trankvilan vojaĝon, kiel estis la mia.

P.S.: Ne kunportu multajn vestaĵojn, ĉar ĉi-tie estas infera varmo!"

(sendis Norma Cescotti)

Malnova spritaĵo

Dum la pasintjara U.K. en Rejkjaviko (2013) humoristo rakontas spritaĵon. Fine maljuna sinjorino diras:

- Mi jam aŭdis ĉi tiun spritaĵon en Parizo dum la U.K. de 1950.
- Ĉu estas mia kulpo, ke vi vivas tiom longe?

Edzoj

- Mi ekkonis mian edzinon nur kvin monatojn antaŭ nia geedziĝo.
- Mi ekkonis mian edzinon nur kvin tagojn post nia geedziĝo.

Fervoje

Ĉe la roma stacidomo, sinjorino volas aĉeti bileton al Pekino. La deĵoranto atentigas ŝin, ke estus pli konvene vojaĝi per aviadilo, sed ŝi timegas aviadilon kaj ŝipon pro tio ŝi insistas pri la trajno. La deĵoranto trafolumas horarojn, telefonas, kaj post duonhoro, ŝi diras:

- Sinjorino, ĝis nun mi sukcesis aranĝi itineron ĝis Timiŝoara. Estas pli bone ke vi revenu morgaŭ.

La postan tagon ŝi revenas, kaj la kompatinda deĵoranto diras al ŝi:

- Mi ankoraŭ ne finis... mi havas bileton ĝis Bagdado. Provu reveni morgaŭ!

Tagon post tago, li sukcesas havi bileton al Teherano, Nov-Delhio, Kalkato, Ŝangajo ĝis fine Pekino. La sinjorino tuj ekvojaĝas, sed baldaŭ, ŝi ekkonscias, ke ŝi ne aĉetis la reven-bileton. Pro tio, post du-semajna vojaĝo per trideko da diversaj trajnoj, atinginte Pekinon, ŝi tuj kuras al fervoja biletejo:

- Mi deziras trajn-bileton al Romo!
- Ĉu al Lomo Telmini aŭ al Lomo Tibultina?.

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2014/

